

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 3-an de majo
Cléa prelegos
- Sa, la 19-an de junio
Ekskurso
- Lu, la 6-an de septembro
Decidota
- Lu, la 4-an de oktobro
Decidota

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Lunde, la 5-an de aprilo 2021 je la 20-a en *Espace Dickens* en Laŭzano Ĝenerala Asembleo

24Heures - la 8-an de februaro 2021

Hector Hodler, vivo dediĉita al la paco kaj al esperanto.

Libro erudicia rakontas la ekziston de la pentrista filo, multe malpli fama ol Ferdinand, sed kies idealoj kaj agoj tamen impresis lian epokon.

Hector Hodler aperas kiel romanda interesa eminentulo de la komenco de la XX-a jarcento. Lia pensmaniero ampleksa kaj preciza profunde irigaciis la esperantistan movadon kaj la pacifistajn idealojn de lia epoko, kiel rivelas verkaĵo sciencula - kaj dulingve franca-esperanto - eldonita ĉe *Notari (Eld)*.

Hector naskiĝis en 1887 el la amoroj de lia patro kun Augustine Dupin. Li 15jaraĝas, kiam eksplodas, en 1902, la ĝenerala striko en Ĝenevo. Tiumomente la adoleskanto esprimas viglan spiriton humanistan kaj asertas sian sentemecon fronte al la socia sufero kaj denuncas la perforton de la aŭtoritatoj.

Li multe admiras sian patron kaj ofte pozas por la pentristo. Ili muzikas kune. Hector ankaŭ lernas pentri kiel atestas pentraĵoj kaj desegnoj fare de li mem. Li legas multe. En siaj intimaj kajeroj, li mencias, ke li voregis la dektri verkojn de Zola inter 1905 kaj 1906. Li malŝatas kaj kritikis la studadon kaj eliras el la «Collège Calvin» sen diplomiĝi.

Rapide la juna Hodler pasiiĝas pri la universala lingvo. Kune kun sia amiko kaj klaskamarado Edmond Privat, li alproksimiĝas al la filozofo, Ernest Naville, kiu « prezentis kaj subtenis esperanton en la Franca Akademio pri moralaj sciencoj en 1900».

La du knaboj kreas junecan klubon esperantistan, kaj, en 1907, Hector ĉefredaktas la revuon « Esperanto » antaŭ fondi kaj prezidi, la postan jaron, la Universalan Esperanto-Asociacion (UEA), kies sidejo estis en Ĝenevo. La organizo nuntempe loĝas en Roterdamo kaj nombras

membrojn el 120 landoj. Dum la unua mondmilito, preskaŭ 50'000 dokumentoj transitas tra la asocio permesante konservi la kontaktojn inter la diversaj popoloj de la batalantaj landoj.

La tuberkulozo trafas Hector en 1912 - familia fatalaĵo - kiu postulas longajn restadojn montarajn. Li forpasas 32jaraĝa, en Leysin marte 1920. Lia vidvino Emilie Hodler-Ruch restis tre fidela al la memoro de sia edzo. Ŝi konservis ĉiujn dokumentojn, kiuj nun estas konservitaj ĉe la Jurasaj Arkivoj Brüscheweiler. Ĉijare la Svisa Esperanto-Societo solenas la centjariĝon de la morto de Hector Hodler.


Irène Languin
Resumis kaj tradukis
Francisko

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com ...esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)



LA FANTOMOJ DE LA LAGO *versio A, parto 4 (fino)*

	7			9		6	1	
2			1	7				
		1				8	3	
		9				6		
4	3	8		2			7	
		8				4		
		7				9	8	
8			3	9				
	6				8		4	5



9							1	2	
	7	5							
				2	6				
				5	7			1	
6	9							4	8
	4			6	9				
					2	1			
								3	8
	5	8							4

Influitaj de la stranga etoso, tute silente ni levias niajn glasojn dirante tre tre mallaŭte «*Je via sano*». Mi rekonas nian lokan sekan kaj iomete akran vinon. La menukarto surtabla klarigas, ke estas nur unu menuo por ĉiuj: «*Rataj rostaĵoj kun ĝina saŭco kaj satanaj legomoj*». Tiumomente ekaŭdeblas drama muziko. Du novaj gastoj alvenas, kiuj, kiel ni, ŝajnas ne esti kutimaj gastoj tie kaj ni rimarkas, ke ankaŭ ili estas ĝenataj de la stranga etoso. Ni ne plu riskas kunparoli kiam, fine de la muziko, alvenas viro, nigre vestita kaj portanta bulĉapelon: «*Ĉiu el vi ĉeestas por vivi ĉivespere strangajn momentojn kun aperaĵoj, kiel vi neniam vidis antaŭe. Ĉu vi sentas, ke la tri ŝorcistinoj promenas apude?*» Li tiam vokas: «*Venu fantominoj de la lago, ni pretas.*»

Mistika muziko rekomenciĝas; nebulo lagsurfacen alvenas el la profundo. Aperas el la blanka nuboj tri inaj formoj, kiuj rondodancas tenante sin permane. Ni perfekte povas vidi de nia loko iliajn vizaĝojn senesprimajn, la buŝon fermitan, iliajn okulojn

jetantajn fajron kaj la nazon, kiu forpelas fumon. La odoraĉo de «rostitaj ratoj» tutloken invadas. Pli kaj pli la muziko mallaŭtiĝas; aŭdeblas ploroj kaj plendoj. La luno supreniras en la ĉielo kaj, unu post la aliaj, la «fantominoj» alproksimiĝas ĝis la bordo de la lago. Subite malvarma vento blovas inter la spektantoj, kiuj forte reagas; virino eĉ krias kaj svenas. Tuj la kreaĵoj malaperas magie kaj ĉiuj restas ŝtonigitaj. La silento daŭras longe, ĝis kiam unu viro ekaplaŭdas sekvata de kelkaj aliaj.

Ĉiuj pli kaj pli revenas al la realo kaj ankaŭ aplaŭdas laŭte. Tiumomente la kelneroj alportas la telerojn, en kiuj kuŝas peco da rostita kuniklokruro akompanita de nedifinitaj legomoj. Vesperfine la pirato, sen sia okulbendo, alportas al ni tri brandojn avertante: «Atentu ĝi altas je naŭdek gradoj.» Li fiksrigardas mian amikon: «*Ĉu estas vi Sinjoro Mario el Kebekio?*» Tutmirinde mia amiko kapjesas. La maristo daŭrigas: «*Mi havas leteron por vi.*» Mario hezitante prenas kaj rigardas ĝin longe. Li malrapide malfermas la

koverton, sur kiu estas skribite: «Por Mario zorge de la «maristoj de La Olda Ŝipo». Mario komencas eltiri kaj malfaldi la leterpaperon. Pli li legas pli la larmoj glitas el liaj okuloj al liaj vangoj. Ni restas paralizitaj.

La ŝipisto rompas la silenton: «*Stefano estis kutimulo de niaj eventoj kaj ega amiko de ĉiuj ĉitie. Li mem organizis la enscenigon de tiu vespero.*» Mario komencas la legadon: «*Kara Amiko. Mi feliĉas, ke vi venis malkovri nian fantoman spektaklon en Svislando. De longe mi esperis inviti vin spekti ĝin. Bedaŭrinde la destino decidis alimaniere. Antaŭ du monatoj mia kuracisto malkovris tre gravan... mortigan malsanon dorsan neresanigeblan, kiu eg...ege dolorigas min eĉ kun analgezikoj. La doktoro anoncis al mi, ke post iom da tempo mi devos sidi en rulŝeĝo. Mia vivo ne plu estas vivebla. Mi decidis foriri al la alia mondo antaŭ infero. Mi petas al vi pardonon pri mia ago. Mi scias, ke el la transmondo mi certe konservos esoteran kontakton kun vi. Via amiko por ĉiam. Stefano. PS: Vivu la Fantomoj de La Lago.*»

Intervjuo de Sarah kaj Sylvain Meigniez, fidelaj membroj de LES

(Fare de Francisko)

- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.

Sarah: Mi naskiĝis en Berno septembre 1984 kaj ne longe poste miaj gepatroj venis loĝi en Nyon. Mi studis en la *Alta Lernejo pri Sano* (HES) kaj nun laboras kiel flegistino.

Sylvain: Mi estas infano de «La Côte» kaj naskiĝis ankaŭ septembre sed la antaŭa jaro. Mi konatiĝis kun Sarah en la gimnazio de Nyon. Mi studis historion, arkeologion kaj komputikon en la universitato. Nun mi tre plezure hejmpatras kaj kelkfoje vendas legomojn kaj fruktojn en la bazaroj por kultivisto.

Ni gepatras du filojn, Basile (2015) kaj Aloys (2016).

- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?

Sylvain: Miaj gepatroj estis amikoj kun Claude kaj Nicole Piron. Do mi delonge aŭdis pri eo. Nicole estas la baptopatrino de mia fratino.

- Kiam vi decidis studi esperanton?

Sarah: Mi partoprenis studkonkurson de *La Stelo* en Ĝenevo en 2008 kaj poste... parte «lernu.net», parte kursojn en La Chaux-de-Fonds kaj ankaŭ *Babiladajn Rondojn* en Laŭzano. Veras, ke ni multe studis esperanton dum nia mondroniro en 2013.

- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?

Sylvain: Amuze. Mia patrino neniam studis esperanton sed organizis en Nyon «Passeport Vacances» por propagandi pri ĝi.

- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?

Kun Basile, ni partoprenis la UK-on en Lilo/Francio en 2015 kaj la postan jaron en Nitro/Slovakio, kiam ni ĵus malkovris la «preparadon» de Aloys.

